

ĈEA-retkomunikoj 3/2004

CxEA-retkomunikoj estas neregula dissendolisto de Cxehxa Esperanto Asocio por informi siajn membrojn kaj pliajn interesatojn en (kaj ekster) Cxehxio. Por malaligxi sufcixas sendi mallongan mesagxon al chrdle@kava-pech.cz

ENHAVO:

1. NE PRETERVIDU: Nova dato de la CxEA-konferenco en Olomouc
2. ATENTU ANKAUX: La kultura festivalo en Ústí ne okazos
3. KAEST: regula regula renkontigxo de fakuloj
4. Internacia Paroliga Semajno: unu el la vojoj al perfektigxo
5. Alvoko por la organizantoj de Esperanto-arangxoj

1. NE PRETERVIDU: NOVA DATO DE CxEA-KONFERENCO

Kvanakam en Starto (gxuste nun presata kaj dissendota) jam estas nova dato, mi atentigas cxiujn, ke dum la antauxanoncita dato de la konferenco okazos la balotoj por la Senato, tial ni kiel pli malfortaj devis cedi. La aktuala dato de la konferenco estas de la 19-a gxis 21-a de novembro, la loko restas: Olomouc. Kontaktadreso kaj aligxiloj: cea.polnicky@quick.cz.

2. ATENTU!!! Internacia Kultura Festivalo en Ústí nuligita!!

La venontsemajnfina 17-a Internacia kultura festivalo Ústí n/Labem, 2004-10-01/03., estas nuligita pro malsano de la cxeforganizanto de Miroslav Smyčka. Tio ne tuxas la Cxehxan-Sachsán Tagon en Ústí, kiu okazos lauxprograme 2004-12-11. Inf.: Jozefo Kříž, <ingjopek@volny.cz>.

3. KAEST: regula renkontigxo de fakuloj

Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko kunvenigas cxiun paran jaron regule fakulojn kaj interesatojn pri terminologio kaj fakaj aplikoj de Esperanto. Cxijare gxi okazos lauxplane en Dobřichovice de la 12-a gxis la 14-a de novembro. La cxeftemo estas Fake pri Esperanto, do precipe pri E-terminologio, la dua sekcio nomigxas Esperante pri Sciencoj, dum kiu estos fakaj prelegoj el diversaj fakoj. Pli proksimajn informojn (inkluzive de la resumoj de jam akceptitaj prelegoj) kaj aligxilojn vi povas vidi cxe <http://www.kava-pech.cz/kaest>. Jam aligxis partoprenantoj el Bulgario, Cxehxio, Danlando, Francio, Germanio, Hungario, Pollando kaj Serbio kaj Montenegro kaj Slovakio.

4. INTERNACIA PAROLIGA SEMAJNO: unu el la vojoj al perfektigxo

De la 29-a novembro gxis la 5-a de decembro okazos jam duan fojon Internacia paroliga semajno. Gxi ne estas celata por kompletaj komencantoj, sed jes ja gxi okazos en du grupoj, nome komencintoj (do kun antauxaj almenaux bazaj konoj) kaj progresintoj. La du grupojn gvidos Stano Marček kaj Petro Chrdle. Pliajn informojn kaj aligxilojn

vi trovos pere de <http://www.esperanto.cz> (same kiel pri la CxEA-konferenco kaj KAEST) aux cxe chrdle@kava-pech.cz. La paroliga semajno jam estos certe internacia pro jamaj aligxiloj de 5 francoj kaj belgo.

5. Alvoko por la organizantoj de Esperanto-arangxoj

En venontaj CxEA-retkomunikoj ni volus aperigi se eble kompletan kalendaron de la E-arangxo en Cxehxio kaj en proksimaj regionoj de najbaraj landoj. Cxiuj organizantoj do estas petataj sendi bazajn informojn pri la preparata arangxo (nomon, lokon, daton, kontaktadreson) al chrdle@kava-pech.cz, cxar nur de vi dependas, cxu la kalendaro estos vere kompleta aux ne.